


# HAMBURG Esperanto



1/2003

Decembro/Januaro

Bulteno de Hamburga Esperanto Societo r. a.

## **Belan Kirstnaskan Feston kaj Feliĉan Novan Jaron!**



La urbodomo kaj kristnaska foiro  
en Hamburg

### **Editoraĵoj**

Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo*  
r. a.

Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg  
Tel/Faks: +49 40 250 30 65

Prezidantino:

[Dr. Vesna Stanicic-Burchards](#)

Redaktoro: [Benno Klehr](#)

Retpoŝto: [Hamburg@Esperanto.de](mailto:Hamburg@Esperanto.de)

La estraro de  
Hamburga  
Esperanto-Societo  
deziras belajn  
Kristnaskajn tagojn  
kaj bonfarcon en la  
nova jaro!

Redaktofino de



n-ro 1/03: 15-01-2003

La HES klubejo malfermita Jhaŭde ek de  
18:00 h

Programo: 20:00.

Esperanto Haus donnerstags ab 18:00  
Uhr geöffnet.

Programm: 20:00 Uhr.

### **Jarĉefkunveno 2003**

de Hamburga Esperanto-Societo  
okazos la 20an de Februaro je la  
20a horo en la Esperanto-Domo

### **Kurso**

Jaŭde ek de la 18.00 h ĝis 19.30.h  
okazis nova kurso por komencantoj en la  
klubejo.

Gvidis Kerstin Baasch kaj Vesna  
Stanicic-Burchards.

## Esperanto en Kijlo en 2002.

Dum la lasta semajfino kuniĝis 23 samideanoj de DE, CH, CZ kaj DK por festi en amikeca etoso la 100jariĝon de la unua Esperanto-grupo en la urbo Kijlo (germane Kiel). Vendrede post la komuna vespermanĝo okazis Interkona Vespero dum ĉiuj havis eblecon interkonatiĝi kun novaj vizaĝoj kaj babili kun malnovaj konatoj. Sabate kadre de tuttaga ekskurso al la urbo Rendsburg okazis la jarkunveno de la provinca asocio Ŝlesvig-Holstinia Esperanto-Ligo / SHELO en suna kunsido apud la fama fervoja ponto kun sia rulpendanta pramo, kiu reprezentatiĝis sur poŝtmarko lastjare. Post promenado tra la iama garnizona urbo, la partoprenantoj ĝuis 3-horan ŝipvojaĝon tra la Kijla Kanalo ĝis la enurba haveno. Ili poste denove renkontiĝis en la restoracio Malnova Fumaĵejo por kune frandi festmanĝon kun kiel kulmino 3 grandaj salmoj bakitaj en centimetrodika salkrusto. Christian Darbellay skizis en mallonga parolado la historion de Esperanto en la urbo Kijlo, ne forgesante atentigi la aŭskultantojn ke la nomo Kijlo nun enestas PIV2. Pluraj ĉeestantoj transdonis salutojn el siaj grupoj aŭ eĉ landa asocio, kiel Dana Esperanto-Asocio, inter alie Pit Kreiner gratulis nome de la plej malnova grupo de la mondo Nürnberg kaj Hella Lanka transdonis belan florkronon nome de la Hamburga Esperanto Societo. Krome legiĝis multaj gratulkartoj, leteroj kaj retmesaĝoj eĉ el Kanado kaj Afriko. Dimanĉe la Esperanto-amikoj promenis iom tra Kijlo, vizitis la urban muzeon kaj disiĝis post la lasta komuna manĝo en ĉina restoracio apud la forirejo de la pramŝipo al Gotenburgo, kiun certe multaj uzos por atingi tiean UK 2003. Jam nun la Kijlanoj invitas vin survoje al Gotenburgo partopreni Antaŭkongreson in Kijlo kaj sia regiono, la lando inter la Balta kaj la Norda Maroj. CD

2a Kijla Lingvo-Merkato 2002.09.26 Kadre de la 11aj Interkulturaj Semajnoj de Ŝlesvig-Holstinio kaj okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj la urbo Kijlo organizis la 2an Kijlan Lingvo-Merkaton. 16 asocioj kaj lingvolernejoj prezentis sin en la urba biblioteko. Pro manko de varbado la vizitantoj ne estis tro multnombraj. Tamen la membroj de la Kijla Esperanto-Klubo kontentiĝas pri la interesiĝo. Ili havis la eblecon prezenti PIV2 al ĵurnalistoj kaj de Kieler Nachrichten kaj de televido Regional N24. El ĉirkaŭ 10 interesiĝantoj 3 partoprenos semajnfinan kurson kaj aliaj 2-3 montris intereson pri la brazila reta kurso. La esperantistoj ankaŭ profitis la okazon por prezenti sin pli detale al la prizorgantoj de la aliaj informstandoj kaj interŝanĝi spertojn. Ni ĉiuj konsentis, ke malgraŭ ĉi-jaraj manketetoj ni jam pretas por la 3a Lingvo-Merkato. CD

---

## Hamburga Semajno 17. - 25.7.03

En somero 2003 ni atendas vizitantojn el multaj landoj en nia bela kaj interesa urbo Hamburgo plena de vidindaĵoj kaj kulturo.

Ni havos unikan programon inter alie por tiuj, kiuj survojos al la Universala Kongreso en Göteborg kaj la Internacia Junulara Kongreso en Lesjöfors en Svedio. Hamburga Esperanto-Societo komencis prepari internacian renkontiĝon, dum kiu ni ofertos gvidadojn tra la urbo, kulturajn programojn, prelegojn, ekskurson al la maro kunlabore kun la esperantistoj en Kiel, kaj vesperojn en harmonia rondo, en nia klubejo, ein trinkejoj.

Por la preparo kunvenis laborgrupo de 5-6 personoj, sed ni bezonas pli da helpo por la preparado kaj dum la renkontiĝo.

Tiu ne nur estas tasko por la estraro. **Ĉiu** membro povas helpi, ni bezonas **vin** kaj

viajn kapablecojn.

Bonvolu turni vin al la estraro aŭ rekte al

[Gerald Roemer](#) Tel. 491 71 94.

Ni plue raportos en la HES-informilo pri la preparlaboroj.

Gerald Roemer \* Hamburg

### Nia programo

Decembro 2002	Januaro 2003
<p><b>5</b> Hamburga temo</p> <p><b>14</b> Zamenhoffesto Komenco 19.00 h</p> <p><b>19</b> <i>Orlando Roala:</i> <b>Esperanto-vivo en Kubo kaj aliloke</b></p> <p><b>Gis la fino de la jaro la klubejo restas fermita</b></p>	<p><b>2</b> <i>klubejo fermita</i></p> <p><b>9</b> <i>Klaus Friese:</i> <b>Esperanto en la Gimnazio de Wentorf (kun filmo)</b></p> <p><b>16</b> Raportoj pri nov- jaraj renkontiĝoj</p> <p><b>23</b> <i>Werner Bormann:</i> <b>Altona kaj Ottensen</b></p> <p><b>30</b> Klubaj aferoj</p>
<p>Estrarkunsido de HES okazos la 05.12.2002 je la 18-a horo en la klubejo</p>	<p><b>Proponoj al la jarĉefkunveno 2003 devas atingi la estraron ĝis la 31a de Januaro 2003</b></p>

### Speciala programo la 19an de Decembro

Malgraŭ nia kutimo dum la pasintaj jaroj, post la Zamenhoffesto ne plu kunveni ĝis la nova jaro, ĉi-jare ni havos plian klubvesperon por akcepti gaston, kiu nur venos dum tiu certa tempo:

S-ro Orlando E. Raola, Esperantisto kun kuba deveno kiu nun vivas en Usono. Li vizitos nin de la 17-a ĝis la 19-a de Decembro. Ĵaŭde, la 19an, li ŝatus prelegi en nia klubejo pri sia Esperanto-vivo. Li estis kunfondinto de la Esperanto-elsendoj den Radio Havano, kaj nun li tre aktivas en la Esperanto-Ligo de Nordameriko.

---

#### Mitliedsbeiträge für das Jahr 2003

##### Beiträge Esperanto-Verein Hamburg

44 € normale Mitgliedschaft/Personen mit Einkommen

22 € Familienangehörige, Jugendliche, Mitglieder ohne eigenes Einkommen

##### Beiträge Deutscher Esperanto-Bund

46 € Personen mit Einkommen

30 € Jugendliche mit Einkommen (bis 27)

23 € Personen ohne Einkommen (Studenten, Arbeitslose..)

## Planoj de Esperanto-Kiel por 2003

La kijlaj esperantistoj planas diversajn aranĝojn dum la jaro 2003: 10 jaroj SHELO Ŝlesvig-Holstina Esperanto-Ligo estis fondita la 30an de januaro 1993 en Kijlo. Certe multaj el vi memoras pri tio ĉar pluraj hamburganoj partoprenis la fondokunvenon. Nun Kijlo denove invitas vin al kunfestado de la 10-jariĝo, sabaton la 1an de februaro 2003. Detaloj aperos en la venonta Esperanto-HH, sed bonvolu jam nun rezervi la tagon.

Antaŭkongreso de UK Gotenburgo

Ni ekhavis la ideon profiti de la fakto, ke verŝajne pluraj partoprenantoj de la UK en Gotenburgo uzos la pramon den Kijlo por oferti antaŭkongreson en la nordo de Germanio.

Viaj proponoj pri la programo kaj helpo pri la tago en Hamburgo estas tre bonvenaj. Ĝis nun ni antaŭvidis la sekvan programon.

Ni planis fari ĉiujn ekskursojn trajne. Espereble UEA akceptos la proponon kaj multaj esperantistoj el la tuta mondo emos konatiĝi kun nia regiono.

Sa 19.07. Alveno / Interkona Vespero Di 20.07. Lübeck Lu 21.07. Hamburg Ma 22.07. Flensburg / Schleswig Me 23.07. Hallig Hooge / Amrum Ja 24.07.?? Ve 25.07. Libera tago / Foriro de la pramŝipo al Gotenburgo

20a IF: jubileo en norda Germanio

La 20a Internacia Festivalo organizita de Hans-Dieter Platz okazos 27.12.2003-03.01.2004 en la junulargastejo de Kijlo, ĉ. 500 m de Esperanto-Kiel.

Christian Darbellay akompanos la promenulojn al 2-3 interesaj vidindaĵoj, kiel la kanalkluzoj aŭ la ŝipmuzeo. Certe kelkaj el vi ŝatos partopreni tiun vere interesan aranĝon en sia proksimeco. Vidu: [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

Christian Darbellay, Kaiserstr. 39, DE-24143 Kiel/Germanio +49-431-73 77 88,  
[Esperanto-Kiel@web.de](mailto:Esperanto-Kiel@web.de).

[Re al Esperanto en Hamburg](#)